

1e por ke ekzistu proporcia distribuo de fortoj kaj faroj en kaj per la movado;

2e por akompani, almenaŭ sekvi, la evoluon en la mondo rilate sociajn sciencojn kaj ilian aplikadon, ankaŭ el vidpunkto de internacia organizo.

Tiuj ĉi faktoj devigas nin enkonduki pli aktive la aplikadon de Esperanto en la socian medion. Por tio necesas diversspeca prepara kaj efektiva laboro.

La kongresanoj estas invitataj post sia hejmvieno interkontakti kun siaj esperantistaj estraroj kaj grupoj:

a. por serĉi kaj trovi esperantistojn, kiuj profesie aŭ stude okupas sin en la socia sektoro;

b. por trovi la „dormantojn”, ne aktivajn, kaŝitajn esperantistojn en la socia sektoro;

c. konvinki ne-esperantistojn el la sama profesio- kaj studo-tereno pri la utilo de universala pontlingvo.

(Por konkretigi:

Temas pri esperantista interesiĝo de personoj okupitaj pri aferoj, menciitaj en la listo tie ĉi aldonita).

La agadmaniero eltrovi tiujn personojn kaj kontakti kun ili estu sistema. Oni se eble kunlaboru por tio en grupetoj.

La persona kontakto kun sociistoj-esperantistoj por vigligi la atenton por Esperanto kaj sociologio estas la plej bona maniero. Kiam evidentiĝas ke tiuj kontaktoj pere de esperantistaj rilatoj estas sufiĉe plenumitaj kaj konstantigitaj, tiam oni (celtrafe klarigante la aferon) enkete petu — en interkonsiliĝo kun la esperantistaj estraroj — informon ĉe konvenaj entreprenoj, institutoj, instancoj, ĉu en ilia personaro estas kunlaborantoj, okupitaj pri sociaj temoj, kiuj lernis esperanton.

El tio rezultos:

1e ke oni trovos esperantistojn ne (plu) konatajn;

2e ke ĝenerala atento estos vekata por esperanto; tiu paŝo povos esti sekvata de klopodoj akiri novajn aktivajn interesiĝantojn.

Valoras ke oni kolektu la titolojn kaj menciu la ĉefenhavon de esperanto-artikoloj pri sociaj sciencoj aŭ soci-praktikaj aferoj, por ke oni povu montri tiujn verkaĵojn al interesiĝantoj kiel pruvon de ebloj.

Necesas ankaŭ ke oni komencu traduki en esperanton mallongajn menciojn el naciaj gazetoj kaj revuoj, kiuj temas pri sociaj sciencoj aŭ socia aplikoj, por ke tiuj tradukaĵoj povu esti publikigataj kaj informe sendataj al la komisiono.

La raporto de la komisiono „Esperanto kaj Sociologio” pri la agadjaro 1950/51 kaj la resumo de la preparolado en la kunveno de la 10a de aŭgusto 1951 estu sendataj al interesiĝantoj.

C. J. KEUR, sekretario,
Moerweg 76, Den Haag,
Nederlando.

SOCIOLOGIO (esplora, aplika).

Temoj de observo, ekzameno kaj prilaboro.
Skizo.

0. Metodologio de sociologio kaj instruo de sociologio.

Historio de sociologio.

Statistiko.

Demografio.

1. Heredeco kaj medio.

2. Sociaj strukturo kaj institucioj:

a. rasgrupoj, kontraŭismoj (kontraŭsemidismo k.a.)

b. popoloj, nacioj, naciecoj;

c. minoritatoj; periferi-grupoj;

d. familio kaj parenco, seksoj, aĝogrupoj;

e. sociaj tavoloj, klasoj, profesi-grupoj;

f. lokaj komunumoj, urbo kaj kamparo;

g. societoj;

h. aliaj sociaj institucioj kaj kutimoj.

3. Sociologio de la ŝtato:

a. ŝtat-formo kaj partioj.

4. Sociaj dinamiko kaj procedoj:

a. kontaktoj;

b. konkurado, konflikto, disiĝo, akomodigo, asimiliĝo;

c. migrado;

d. vertikala socia moviĝado;

e. sociaj movadoj;

f. milito kaj revolucio;

g. sociaj krizoj.

5. Sociologio de kulturo:

a. sociologio de ekonomia vivo;

b. „ „ laborrilatoj;

c. „ „ religio;

d. „ „ medicino;

e. „ „ lingvo;

f. „ „ moralo;

g. „ „ juro;

h. „ „ scienco, scio kaj pensado;

i. ideologioj;

j. sociologio de arto;

k. „ „ modo;

- l. sociologio de historio;
- m. " " eduko;
- n. " " uzado de libera tempo;
- o. " " tekniko, eltrovoj kaj inventoj.

6. Socie-patologiaj fenomenoj:

- a. narkotismoj (alkoholismo k.t.p.);
- b. prostituado;
- c. sinmortigo;
- d. aliaj socie-deviaj aŭ socikontraŭaj kondutoj.

7. Socia psikologio:

- a. grupo-karaktero, grup-bildo;
- b. individuo kaj grupo; personeca strukturo;
- c. gvidado, prestiĝo, potenco;
- d. gazetaro kaj propagando;
- e. publika opinio;
- f. sociaj sinteno, normoj, kondutfiguro;
- g. sugestio, onidiro, mitoformiĝo, superstiĉo.

8. Socia laŭplana agado:

- a. socia ordigo;
- b. spaca ordigo.

9. Socia prizorgo:

- A. a. sociaj observado kaj raportado;
- b. socia dokumentado;
- c. socia statistiko;
- d. socia klariga informado;
- e. kunlaboro pri sociaj aferoj inter organizoj;
- f. kunordigo de sociaj organizaj problemoj;
- g. stimulado de, konsilado pri, subvenciado de sociaj aranĝoj;
- h. sociaj gvidmetodoj i.a. grupa, individua;
- i. instruo pri kaj eduko por sociaj sciencoj kaj laboro.
- B. a. Sociaj raso- kaj gento-problemoj;
- b. familio-prizorgo; i.a. gepatra eduko; informo pri mastrumado; por-infana subvencio;
- c. prizorgo de soluloj;
- d. socia prizorgo en rilato al diversaj aĝogrupoj: junularo, maljunigantoj, maljunuloj;
- e. socia zorgo pri korpe aŭ psike, provizore aŭ daŭre invalidaj personoj: malsanuloj, resaniĝantoj; rekapabiliĝantoj; konstante malhel-pitaj personoj;
- f. zorgo pri personoj de socie-devia aŭ socikontraŭa konduto: drink-

emuloj; narkotiĝemuloj; readapto de konfliktoj, deliktuloj, krimuloj;

- g. konsilado pri diversaj sociaj malfacilaĵoj rilate al vivo, familio, eduko, studo;
- h. rajto-protekto; jura asisto;
- i. helpo al ekonomie malfortaj personoj: kreditodonado; uzuro-kontraŭado; okaza aŭ perioda subtenado, mona aŭ aja;
- j. socia helpo al aliaj grupoj.
- C. a. Dumtempa aŭ daŭra loĝado, establiĝo; sociaj problemoj i.a. sekve de limigita nombro de loĝejoj kaj domoj;
- b. socia prizorgo en lokaj medioj: kampadejo, barakaro, kamparo aŭ vilaĝo, urbo;
- c. socia helpo je eksterordinaraj cirkonstancoj, akcidentoj, katastrofoj.
- d. migrado (interna m., enmigrado, transmigrado, elmigrado); ankaŭ: evakuado, forpelado, rifuĝado;
- e. socia zorgo pri samŝtatanoj en eksterlando;
- f. socia fremdulprizorgo.
- D. a. Socia procedo pri distribuo de taskoj kaj plenumoj: entreprenaro, konsisto, organizo;
- b. profesio-inventarado;
- c. profesio-klasifikado;
- d. profesio-konsilado;
- e. laborkondiĉoj, devoj, rajtoj;
- f. ĝustigo de laborcirkonstancoj (sendanĝerigo, ktp.);
- g. asekuroj kontraŭ malsano, akcidento, invalideco, ktp.; pensioj;
- h. laborperado;
- i. laborrilatoj: dungo, deĵoro, eksigo; kontaktcentro; malkonsentoj; konfliktoj; interkonsiliĝo;
- j. personargvido; tasko-komunumoj; plenumgrupoj;
- k. laboro kaj sekso; aĝo; invalideco;
- l. personar-selekto;
- m. socia personarservo;
- n. prizorgo de senlaboruloj: personeca, laborhaviga, financesubtena (asekure aŭ helpe), faklerniga, kleriga, kultura;
- o. interkomunuma kaj interregiona alilokado de laborantoj;
- p. aliŝtataj laborantoj.
- E. a. socikultura prizorgo por taŭga pasigo de ferioj kaj uzo de alia libera tempo;
- b. sporta, luda, ripozamuza, kleriga, studkluba aranĝoj;
- c. specialaj grupoj, ekzemple maristoj;
- d. aliaj aranĝoj.